

& Bal...ado:

< Rekante 21 el 37 batoj por strofo, entute 259 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (La stranga butiko, 1931). Baladigis Martin Strid (2017) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por Balado pri maltima formiko. Klarigoj (*): '4 Charleston, moda danco ekde 1923. '7 Danzig, germana nomo de pola urbo Gdansk.>

(#Melodio:

<:37> (/mimi dodo mimi dodo; SoSo rere fafa re; SoSo rere fafa rere; SoSo dodo mimi do;

(#Rekantaĵe: dodo fafa lala fafa; dodo mimi soso mi; rere fafa rere; SoSo mimi soso mi; re emi fare Tire do o;)

)×7)+

(&Strofoj:

,& Unua:

'1 /Ho jarcento de l' sensenco, ; Fina fino de romanco! ; Ĉirkaŭ ni nur dekadenco; Aŭ almenaŭ... peka danco!

(×; **Dancu per la ses piedoj ; Dancu paŝon post la paŝ' ; Ĉiun paŝon kredu ; kaj ne metu ĝin en maŝ' ; Dancu paŝon post la paŝ'.**)

'2 Certe ankaŭ praepoke ; Jen kaj jen okazis baloj, ; Sed hodiaŭ ĉiuloke; Baloj estas... kanibalaj!

'3 Ĉar kapablas nur la negroj ; Torde – kvazaŭ pro koliko – Moki dum deliraj febroj ; Leĝojn de la... balistiko!

,& Dua:

'4 Senkomprene saĝa homo ; Miras pri la "ĉarlestonoj", ; Kvankam li (aŭ lia domo) ; Havas multe da bal-konoj!

,& Tria:

'5 Nun laŭ takt' aŭ kontraŭtakto ; Komenciĝas la fokstroto, ; Kaj sen "takto" (pro l' kontakto) ; Ĝi finiĝas per... koksfroto!

'6 Pli ol la fabel-cikado ; Junulin' laŭ nuna stilo ; Zorgas pri la mastrumado: ; Ŝi ja estas... bala ilo!

,& Kvara:

'7 Kaj vi mem, amiko, ĝuis ; La dancarton de l' progreso, ; Se vi ankaŭ rendezuis ; Ĉe... l' Danciga* Mondkongreso!